

ESPERANTO TRIUMFONTO

ELDONANTOJ:
 D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
 W. M. Page, adv., Edinburgh.
 E. Archdeacon, Paris.
 Joan Gilli Norton, Barcelona.
 Teo Jung, Köln (Kolono).
 Frans Schoofs, Antwerpen.
 P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
 Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
 Kun-redaktoro: M. Bulin.
 Literatura redaktoro: Zanoni.

ADMINISTREJO:
 Köln-Horrem, Reinlando, Germanio.
 Poŝtĉeka konto Köln 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
 Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendado aŭ resendado aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
 ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca paĝo. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
 Komerciaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala letero. — Bibliotekoj, leĝejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
 3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegiaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgiaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la ŝarĝo kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tujan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finigonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 15. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvononjare 25.50 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 3.— mk.).

JARABONO
Aperas semajne.
 kostas po cm² (kvadracntimetro) por ĉiuj landoj 4 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italo kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/6 jarabono); 1 foja enpresoj kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

ANONCOJ
 kostas po cm² (kvadracntimetro) por ĉiuj landoj 4 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italo kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/12 jarabono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/6 jarabono); 1 foja enpresoj kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 77 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 26. Marto 1922.

La Almlito de la Bernejoj.

Por Genève.

Propono priprensinda, de prof. J. Süsler, Saaz, Ĉeĥoslovakio.

La Esperanto-movado iom post iom klariĝas kaj koncentriĝas; ĝi sekvas nun ĉefe du celojn, por almiliti la mondon, nome

1. la enkondukon de Esperanto en la publikajn lernejojn;
2. la enkondukon en la komercaj kaj oficialaj vivon ĝenerale.


Koncerne la unuan punkton ni atingis la enmeton de nia postulo „Esperanto en la lernejojn!“ en la programon de la tria kunsido de la „Ligo de Nacioj“ (22. IX.) — sukceson, ne sufiĉe alte taksindan.

Nun mi antaŭmetas al la pioniroj de nia afero en la tuta mondo jenan proponon. Ĉu ni ne povus multe utili al nia afero en Genève, se ni en ĉiuj lokoj de la mondo, kie Esperanto estas reprezentata, instigus la komunajn estrarojn, por ke ili en publika kunsido resumu sian rilaton al Esperanto en tiel nomatajn „deklaraciojn“, poste antaŭmetotajn pere de niaj landaj asocioj al la Ligo de Nacioj.

S-o instruisto J. Hájek en Meierhöfen apud Karlsbad en Ĉeĥoslovakio al ni jam montris la vojon, instiginte la komunuman reprezentantaron, decidi jenan deklaron:

Deklaracio:

La komunumo Meierhöfen (apud Karlsbad) vidas en la devastiĝo de la internacia helplingvo Esperanto eminentan ilon al la interkompreniĝado de la diversnaciaj homoj kaj salutata tiun ĉi lingvon kiel progreson en la internacia interkomunikado. La komunumo M. do simpatias kun la enkonduko de ĉi tiu facile elernebla lingvo en la lernejojn, promesante ĉiamaniere subteni la aspiradojn, celantajn la ĝeneralan enkondukon en la publikajn lernejojn. La simpatio al Esperanto ĉe montriĝas en Meierhöfen, la lingvo trovas ĉe bonan fundon, kion pruvas la ĝenerala intereso por ĉiu Esperanta okazaĵo en la ĉi tiea Esperanto-grupo



Esperanta klaso en lernejo de Burntisland, Skotlando.

Oficiala kurso en la lerneja programo sub la „Fife Education Authority“.

Kelkaj el la infanoj tenas numeron de „Esperanto Triumfonta“. Dekstre oni vidas afiŝon pri la IV-a Internacia Foiro de Praha. La bildo antaŭ la fenestro dekstre estas uzata kun la lernolibro „Tra la Jaro“. Oni instruas la infanojn laŭ la „rekta metodo“. — La lernantoj deziras korespondi kun alilanduloj. Oni skribu al s-o James Rodger, ĉefinstruisto, H. G. School, Burntisland, Skotlando.

Ĉu tiu ĉi ekzemplo ne estas vere imitinda? Ĉu ni per amaso da tiaj „deklaracioj“ ne farus ĉe la Ligo de Nacioj potencajn impresojn? Niaj instruistoj ĉiam, kiam ni postulis la enkondukon de Esperanto, deklaris: Estas tute neeble, la ĝeneralan enkondukon dekreti de supre; la bezono devas nepre veni de malsupre!

Ni do montru tiun bezonon!
 Ni do iru tiun vojon!

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko-Helsingfors, Finnlando.

Kvina Komuniko. (Fino.)

4. Fakaj kunsidoj. Pacifistoj: La Finnlanda Pacifista Ligo invitas ĉiulandajn pacifistojn al faka kunsido. Sin turni al s-o A. Sellinhelmo, Konstantininkatu 25, Helsinko.

5. Aliĝo. La LKK konsideris la aferon koncerni karavanojn kun neesperantistaj partoprenantoj kaj faris la jenajn decidojn por kontentigi ĉies dezirojn

- a) kiel kongresanoj estas enskribataj nur Esperantistoj;
- b) la neesperantistaj karavanoj aliĝu kiel help-kongresanoj por ricevi la permeson uzi la rabatojn donotajn al la kongresanoj, por partopreni en la festaranĝoj, viziti muzeojn ktp. laŭ samaj kondiĉoj kiel la kongresanoj.

6. Novaj aliĝoj:

- 140. S-o Laquer Sándor.
- 141.—142. ges-oj Zimmermann Béla, Budapest.
- 143. s-o Ward Nichols, Washington.
- 144. s-o Yrjö Kasi.
- 145. f-ino Lempi Kasi, Pielavesi.
- 146. s-o Alpo Suomalainen, Konnitsa.
- 147. s-o Josef Schellmann, Bensen.
- 148. s-o Kalle Hakanen.
- 149. s-o Erik Gadd, Helsinko.
- 150. s-o Hanns Sappl, Graz.
- 151. s-o Tauno Hakanen, Turku.
- 152. f-ino Aina Pätiälä.
- 153.—154. s-oj Esko kaj Reino Pätiälä, Uusikylä.
- 155. s-o Henderik Goemans, Konstantinopolo.
- 156. s-o Antonio Kudela, Olomouc.
- 157. s-o Sofi Deo, Nuland N. B.
- 158. s-o Deziderio Felsenburg, Budapest.
- 159. d-ro Fuchs Jenő, Matészalka.
- 160. s-o Tom A. Allan, Montreal.
- 161. s-o Aatto Soinne, Pyhäjärvi O. I.
- 162.—163. s-oj Reino kaj J. V. Huttunen.
- 164. s-o Kustaa Lelno, Viipuri.
- 165. s-o Onni Harpio, Rauma.
- 166. s-o Kaarlo Pelkonen, Teuva.
- 167. s-o Gustav Eichmüller, Poprad-Velka.
- 168. d-ro Roza Schiff.
- 169. d-ro Ignacy Neuberger, Kraków.
- 170. s-o Shigeo Narita, Tokio.
- 171. s-o Georg Wirenlius.
- 172. f-ino Lydia Wirenlius, Helsinko.
- 173. s-o Paavo Lähde, Korso.
- 174. s-o Felix Kaukopaasi, Turku.
- 175. s-o David Tannenbaum, Kraków.
- 176.—177. ges-oj Mikko kaj Aino Saukkonen, Rajokki.

Estro de l' tempo.

de Antoni Lange.*

(El la novelaro: „En la kvara dimensio“.)

Ĵaŭdon, ne plu havante prelegojn posttagmeze, profesoro Johano Kancio Selest revenis jam ĉirkaŭ la unua horo hejmen, kie la domgardisto donis al li leteron kaj malgrandan paketon, alportitajn de la leterportisto. La letero kaj la paketo estis datumitaj el Hindujo kaj venis de Simfariono Lariŝ.

Lariŝ estis konata sciencisto, kiu antaŭ pli ol unu jaro veturis Hindujojn por studi la psĥofizikon de bramanoj kaj aliajn problemojn, ligatajn kun tiu ĉi temo.

Lariŝ estis konata ĉefe en la sciencistaj rondoj, kiel eltrovinto de nova mikroskopo, nomata metamikroskopo. La plej perfekta mikroskopo pli grandigas la objektojn ne pli ol 1800-ĝis 2000-oble. Korpeto granda je 0,001 milimetro ricevas per ĝi la grandon de 0,15 ĝis 0,2 mm.

La metamikroskopo de Lariŝ estis tiel konstruita, ke per la helpo de granda vico da speguletoj konveksaj kaj konkavaj, ligitaj kun la perfektigita mikroskopo, la esplorata korpeto respeguliĝis sur la ekranon en milionobla pligrandigo, t. e. ĝi atingis la grandon de unu metro.

Profesoro Selest studis botanikon kaj esploris la misteron de la kreskaj konstruoj; precipe interesis lin la ĉirklado de suktoj, disvolviĝado de ĉeletoj kaj la fenomeno de kreskado. Fiksi la kreskadon, ekvidi la esencon internan de tiu fenomeno, esplori la aperaĵojn, kiuj kun tio estas lig-

itaj, jen estis la revo de Selest. Prof. Selest kun granda entuziasmo akceptis la metamikroskopon de Lariŝ, tamen tiu konstruo ne solvis ankoraŭ la malfacilaĵojn; por la celoj, kiujn starigis al si Selest, estis necese ekregi la tempon: kiel ekposedi la tempon? kiel daŭrigadi la momenton je senlimo? Unuvorte kiel fari por la kategorio de la tempo tion, kion por la kategorio de la spaco faras la mikroskopo? Pri tiuj ĉi problemoj longe disputadis Selest kun Lariŝ.

Lariŝ havis pri la esenco de l' tempo siajn proprajn, kvankam ne tute klarajn ideojn kaj kredis, ke la hinda psĥofiziko kompletigos kelkajn mankojn en lia pensado. Delonge li intencis veturi Hindujojn — kaj, kiam li fine efektiviĝis sian planon, li promesis, ke eventuale li informos Seleston pri la rezultato de siaj esploroj. Do prof. Selest fervore kaptis la leteron kaj malfermis la paketon. En la sendaĵo estis malgranda boteleto enhavanta cent gramojn da ruĝa fluidaĵo, simila al ĉeriza suko. Surgluita estis blanka papereto kun hindaj literoj, kiujn Selest ne sciis deĉifri, kaj kun subskribo latinlitera: Anehaspati.

Jen estas la teksto de l' letero: „Kara Johano Kancio! Fine mi povas sendi al vi bonan sciigon pri nia afero. Hazardo bonege al mi servis.

Ĉu vi rememoras nian kolegon el Parizo, la hindon Radjendra Lalamiira? Li estis homo ekkoninta same profunde ĉiujn fakojn de eŭropa scienco. kiel ankaŭ la pramalnovan saĝecon de bramanoj. Estas nerifuteble, ke kiom Eŭropo atingis altan perfektecon en la tekniko, tiom ĝi malzorgis la esplorojn de l' homa animo. Ne estas do mirige, ke koncerne la sciadon pri psĥaj fenomenoj ni estas simple infanoj kompare al la senlima, senfunda klereco de la bramanoj en tiu ĉi fako.

Veninte en la urbon Hastinapura, bonŝance mi renkontis Lalamiiran, kiu cetere sin donis grandparte al politikaj aferoj. Tamen dank' al li mi konatiĝis kun kelkaj bramanoj kiel Nisikanta Candraloka Ramasita kaj aliaj, homoj ĉirilate tre estimindaj, egale pro sia virto, kiel pro la sciencoco. Tiuj ĉi homoj multe esploris la esencon de l' tempo. Tio estas kategorio tute diferenca de la spaco, kvankam firme kun ĝi ligita. La tempo havas valoron ne nur eksteran, sed ankaŭ internan. Se ni legas en la hindaj libroj, ke tiu aŭ alia sanktulo vivis 10000 jarojn — tio signifas nur, ke li sciis daŭrigadi la horon je centoj da jaroj; dank' al la potenco de sia spirito li multobligis la tempon laŭvole kaj pligrandigis centoble sian vivon, donante al ĝi senliman intensecon. Laŭ la hinda scienco la ideoj „hodiaŭ“, „hieraŭ“ kaj „morgaŭ“ — estas ĉiokaze la samaj. Unu minuto pasigita en la plej alta spiritalo, signifas tiom, kion cent jaroj; kaj inverse cent jaroj travivataj kreskaje aŭ minerale, signifas tiom, kion unu minuto. La daŭrigado de l' tempo troviĝas do en nia ebleco, kion sciis la hindoj kaj, kiom mi rememoras, Lalamiira diris al mi, ke ili havas eĉ ian kreskajon, kiu estas nomata estro de l' tempo, kaj kiu mehanike faras tion, kion la aliaj atingas per interna perfektigo; ĉar la bramanoj havas du metodojn por fiksi, superi la potencon de l' tempo, ekregi ĝin kaj fine simple liberigi sin de la ĉenoj de l' tempo.

La unua metodo — supera — estas atingebla nur de tiuj, kiuj atingis la plej grandan spiritan noblecon; dank' al longa preparado de niaj spiritalaj fortoj la tempo haltas laŭ nia ordono, reiras ĝis la plej malproksima hieraŭo aŭ fluas en nekonatan morgaŭon, kunigas la tutajn jarcentojn en unu momenton, aŭ kontraŭe unu minuton igas daŭri longajn jarcentojn; fine laŭ nia volo la


tempo tute malaperas, ni estas ekster la limo de ĉia sentado pri la tempo, alivorte ni atingas la senmortecon. Dua metodo, malpli perfekta — apogus sin je fiziologia bazo, t. e. je engluto de la bero. Tiu dua metodo, diris al mi Nisikanta, por vi, Eŭropanoj, estaĵoj dikhaŭtaj kaj viandomanĝaj — estas pli konforma, kvankam nedaŭra; la unuan vi eble komprenos post cent jaroj.

En la societo de kelkaj bramanoj mi iris al la Himalajaj montoj, por trovi tiun kreskajon. Ĝi estas herbeto, nomata anehaspati t. e. estro de l' tempo; ĝi rememorigas loman nian agnus castus, havas etaĵn, belkolorajn berojn, kiel nertera depressa. Ĝia gusto estas agrable-acideta. Tri aŭ kvar beroj sufiĉas por efiki dum 15—20 minutoj da nia ordinara tempo, kiu preskaŭ momente ŝanĝiĝas je centoj kaj miloj da jaroj.

Tiu kreskaĵo estas tre malforta; ĝi kreskas nur sur du pintoj, altaj 10—12000 metrojn, nomataj Tatravanta kaj Matravanta. La vojo estas hela, sed kruca kaj danĝera. Tamen miaj gvidantoj bramanoj sendanĝere kondukis min sur la suprojn, kie mi kolektis sufiĉan provizon da anehaspati. Reveninte al Hastinapura kelkfoje mi entomakigis la berojn de tiu kreskaĵo kaj konvinkigis, ke ĝia efiko estas vere mirakla. Mehanike daŭrigante la tempon, oni vidas 4—5 mil apartajn momentojn, dum la tuta alprena formojn tute novajn, neatenditajn, diferencajn de nia ordinara observeblo.

La mikroskopaj esploroj helpe de anehaspati malfarmas al ni mondojn de misteroj ĝis nun nekonataj. Mi sendas al vi tiun ĉi kreskajon en formo de siropo, ĉar mi timas, ke la beroj dum tiom longa vojo perdos sian kvaliton. La siropo estas daŭra, kvankam ĝi ne efikas tiel forte, kiel la freŝa kreskaĵo. Prenu por ĉiu eksperimento ne pli ol 10—12 gutojn, plej bone en kaliko de forta

* Antoni Lange estas pola verkisto, jam iom konata al la Esperantistaro per la tradukoj de Antoni Grabowski. S-o Lange mem estas Esperantisto kaj Esperantigis el sanskrita lingvo „Nal kaj Damajanti“.



Hagen. — Parkdomo en la ŭrba ĝardeno. Ejo de la Revelo-Kongreso, 29-30. Aprilo 1922.

- 178. s-o Viktor Ruokis, Dotnava.
- 179.—180. ges-oj Karl kaj Minnie von Frenckell, Dresden.
- 181. s-o Toivo Lindberg, Parola.
- 182. s-o Wilhelm Pestinger, Höchst a. Main.
- 183. s-o Alfred Köcher, Uelzen.
- 184. s-o Willibald Matzke, Pensenbeug a. Donau.
- 185. s-o Otto de Beus, Culemborg.
- 186. s-o John Bredall, Croydon.
- 187. s-o Rev. Henry Dawtrey, London.
- 188. s-o Julius Echardt, Höntrop.
- 189. s-o John Tshedajeff, Viipuri.
- 190. s-o Gualtiero Rinaldi, Padova.
- 191. s-o Karl Kochmann, Wien.
- 192. f-ino Aline Sandström, Helsinki.
- 193. s-o Leopold Ehrenpreis.
- 194. f-ino Lea Mets, Tallinn.
- 195. s-o Sepp Osterer, Graz.

La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj: Germanio 28, Pollando 16, Estonio 14, Britlando kaj Holando po 12, Ĉeĥoslovakio 9, Franclando kaj Aŭstrio po 7, Hungario 5, Svislando 3, Litovio 2. Svedlando, Hispanio, Usono, Turkio, Kanado, Japanlando kaj Italio po 1, Finnlando 73, entute 195 aliĝintoj el 19 landoj.

7. *Helpkongresanoj*: La sekvantaj personoj aliĝis kiel helkongresanoj:
5. s-o Otto J. Enterle, Wien.
6. Włodzimierz Pfeiffer, Lodz.

8. *Garantia kapitalo*. La L. K. K. danke notas la jenajn garantiojn: S-o Yrjö Kasi, Pielavesi 300 fmk., s-o J. Grünthal, Haapsalu 300 fmk., s-o H. J. Pättälä, Uusikylä 300 fmk., s-o Paavo Lähde, Korso 300 fmk., s-o Mikko Saukkonen, Rajajoki 300 fmk., konsulo Karl von Frenckell, Dresden 500 fmk., s-o Gualtiero Rinaldi, Padova 300 fmk. Sume 2300 fmk., antaŭa sumo 11 100 fmk., entute 13 400 fmk.

9. *Blindula kaso*. La LKK danke notas la jenajn donacojn por la eldona kaso de la blindaj esperantistoj:

S-o H. J. Pättälä, Uusikylä 25 fmk., s-ro Reino Huttunen, Viipuri 10 fmk., s-ro Onni Harpio, Rauma 9 fmk., s-ro V. Salonen, Viipuri 7 fmk., s-ro M. Saukkonen, Rajajoki 4 fmk., s-ro Willibald Matzke, Pensenbeug a. Donau 0,40 fmk. (kaŭ 20,00), Kazimierz Domoslawski, Warszawa 3,20 fmk., (pmk. 160,00), s-ro O. Bünemann, Hamburg 1,18 fmk. (gmk. 4,00), s-ro John Tshedajeff, Viipuri 6 fmk., s-ro Otto J. Enterle, Wien 5 fmk. (kaŭ

500,00), s-ro Julius Eckardt, Höntrop 2,52 fmk. (gmk. 10,00). Sume 73,30 fmk., antaŭa sumo 323,38 fmk., entute 396,68 fmk.

10. *Donacoj*. La LKK danke notas la jenajn donacojn:

S-o W. M. Page, Edinburgh 21 fmk. (s. 1/10^{1/2}), s-ro H. J. Pättälä, Uusikylä 50 fmk., s-ro Reino Huttunen, Viipuri 16 fmk., s-ro Kustaa Leino, Viipuri 12 fmk., s-ro Gustav Eichmüller, Propad-Velka 1 fmk. (kĉ 2,00), s-ro David Tannenbaum, Wien 6 fmk. (kaŭ 300,00), s-ro A. Salokannel 100 fmk., s-ro W. Saarelainen 50 fmk., s-ro V. Seppänen 50 fmk., Pankahariu, s-ro E. Seppälä, Tavastila 25 fmk., s-ro L. Uotila 15 fmk., s-ro L. Nieminen 15 fmk., Kuhmoinen, s-ro K. Astola, Viipuri 50 fmk., s-ro M. E. Saukkonen 50 fmk., s-ro V. A. Hentinen 10 fmk., s-ro K. Jägerroos 10 fmk., s-ro J. Kouku 10 fmk., s-ro V. Konoff 5 fmk., f-ino Hilma Pimiä 10 fmk., diversaj personoj 11 fmk., Rajajoki, I. A. Nuotio, Pori 10 fmk., s-ro Sulo Aitila 200 fmk., s-ino Hedwig Aitila 100 fmk., Helsinki, Internacia Specimena Foiro de Praha, Praha 400 fmk. (kĉ 500,00), s-ro Willibald Matzke, Pensenbeug a. Donau 2 fmk. (kaŭ 100), s-ro L. Poncet, Lyon 42 fmk. (fr. fk. 10,50), s-ro John Tshedajeff, Viipuri 6 fmk., s-ro Gualtiero Rinaldi, Padova, 46 fmk., (fr. l. 20,00), s-ro Otto J. Enterle, Wien, 5 fmk. (kaŭ 500,00), Sepp Osterer, Graz 2,30 fmk. (kaŭ 230,00). Sume 1.330,30 fmk., antaŭa sumo 4.961,31 fmk., entute 6.291,61 fmk.

La Loka Kongresa Komitato.
Adreso: Poŝto (ankaŭ por mendoj): XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando.
Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

Hagen en Vestfalia.

Hagen estas inter la industriaj urboj de la okc. Vestfalia kaj de la Ruhr-distrikto la plej bela kaj pejzaĝe la plej ĉarmplena. Hagen, kun preskaŭ 100 000 loĝantoj, estas industri-urbo, kies nomo estas vaste konata pro ĝiaj ferproduktadoj. Multe da gigantaj kametuboj sin etendas ĉielen, en kelkaj cent fabrikoj sonadas senĉese la kanto de la laboro, kaj la ĉielo ardas vespere per la fajrobrilo de la alifornoj. Sed nenie en la vasta mondo oni trovas industri-urbon, kie, nur kelkajn minutojn malproksime de la grandurba bruado, la arbaro logas per ĉarmaj promenadoj. Altaj kverkoj, fagoj, abioj kaj ilioj borderas la vojojn

al la montoj, kiuj kvazaŭ giralandoj ĉirkaŭas la urbon. Belaj komercejstratoj distranĉas la urbon, kaj du riveroj, Ruhr kaj Volme, trafluas ĝin.

La historio de Hagen ne estas tiel interesa kaj riĉa kiel tiu de Kolonjo. En 11-a jarcento oni aŭdas unuafoje la nomon Hagen, kiu signifas barajon aŭ teritorion ŝirmatan per ĉirkaŭbaro. La proksimeco de la Ruhr-karbminejoj kaj ferŝtonoj estigis jam en 14-a jarcento la fer-industriion. En 16-a jarcento la lando „Mark“ kaj kun ĝi Hagen estigis parto de la Brandenburga ŝtato. Samtempe la industrio ekfloris. La „Granda Kurprinco“ de Brandenburg sendis klingo- kaj glavoforĝistojn. En 18-a jarcento la malgranda industrio fariĝis grandindustrio. Hodiaŭ oni produktas ĉiujn feraĵojn kaj teksaĵojn. Pli ol 20 000 gelaboristoj laboras en pli ol 200 fabrikejoj. Sed en la urbo de senĉesa laboro la arto kaj la sciencoj ne estas malŝatataj. Ekzistas belega teatro, konata Folkwang-Muzeo, pentristlernejo, konservatorio, gimnazioj por gelernantoj, supera lernejo por maŝinkonstruado. Hagen estas kruciĝejo por diversaj fervojaj linioj kaj de ĉiuj flankoj facile atingebla, kaj en malmulte da tempo oni atingas de ĉi tie piede aŭ per fervejo la belajn ekskursejojn Vetter, Hohensyburg kun kolosa monumento kaj Hohenlimburg kun bela kastelo sur la monto.

Esperanto ne estas novaĵo por Hagen. En februaro 1911 samideano Hartenfels malfermis la unuan kurson, kaj de tiu ĉi tempo kursoj estas aranĝitaj ĉiujare. Depost du jaroj oni instruas nian lingvon ankaŭ en la popola altlernejo. Tiel la gesamideanoj, kiuj vizitis la Revelo-kongreson, ne venos en fremdan landon. Multaj gesamideanoj salutas iin kiel gefratojn kaj zorgos, ke la kongreso fariĝos ne nur sukcesplena por Esperanto, sed ankaŭ ĝojiga kaj rememorinda por la partoprenantoj. H.

Pri la delegitoj de UEA kaj la mondvojaĝantoj.

En ET n-o 69 la redaktoro en sia artikolo „Glosoj“ i. a. diras:

Kelkaj delegitoj, iam plej gastigemaj rilate al samideanoj, forgesis tiun virton, ankaŭ pro tio, ke ekzistas iuj impertinentuloj, kiuj estigas por si la raiton postuli de tute fremdaj Esperantistoj, pretekstante la „internan ideon“ doni al ili loĝejon kaj nutraĵojn, eble por pluraj tagoj, aŭ eĉ monon. Tion, ekzemple, faras certaj t. n. „Globe trotters“ (mondvagemuloj) aŭ naturhomoj, aperantaj ofte en kostumo, kiu ridindigas nian movadon. En la plej multaj okazoj tiuj personoj apenaŭ scias kelkajn frazojn en nia lingvo, aŭ ili lernis Esperanton speciale por la celo vivi je la kostoj de aliaj tro bonkoraj Esperantistoj. —

La red. permesu al mi kelkajn rimarkojn. Antaŭe mi volas deklari, ke oni povas diskuti ĝis la lasta tago pri tio, kio apartenas al la devoj de la UEA-delegitoj kaj kio ne. Tio tute dependas de la delegitoj mem. Ekzistas delegitoj, kiuj konsideras fari sufiĉe ornamante sin per la titolo de delegito. Aliaj ĉiam estas helpemaj kaj oferemaj. Kaj ofte mi ankaŭ konstatis, ke samideanoj-nedelegitoj faris nedevige pli da laboro pordelegita ol la delegito en tiu sama urbo. Do ni ne parolu pri tiu afero.

Pri kio mi tamen volas paroli, estas pri la nomitaj mondvojaĝantoj. La redaktoro ne nomas iun nomon en tiu rilato; sed ĉar laŭ mia scio je la nuna momento nur ekzistas du Esperantistaj mondvojaĝantoj — la holandanoj Seubring kaj Stoeltje — mi, kiel sekretario de la Nederl. Federacio de Lab. Esperantistoj volas skribi defendan vorton por la nomitaj personoj, membroj de nia sekcio Haarlem.

Nu, s-o Seubring estas kiel s-o Stoeltje serioza Esperantisto, kiu faris en sia urbo multe da propagando por nia lingvo. Li refondis la sekcion

Haarlem de la Ned. Fed. de Lab. Esp. kaj estas perfekta Esperantisto. Ambaŭ travojaĝas la mondon kun rekomenda letero de s-o J. W. Sevenhuijsen (en la eksterlando sufiĉe konata) en sia poŝto.

Ke ili iras bicikle kaj ke ili do ne ĉiumomente de la tago povas aperi kiel vojaĝantoj ĵus forlasintaj kupeon unuaklasan, ne povas esti ĝenaĵo por seriozaj homoj, kiaj ni Esperantistoj ja devas esti.

Estas vere, ke ili de tempo al tempo petas helpon, manĝaĵojn kaj loĝejon al la Esperantistoj de iu urbo aŭ al iu delegito sed oni ne povas nei, ke ili faras multe da propagando, ĉar ofte s-o Seubring en unu urbo paroladas kelkfoje antaŭ rapide aranĝita propaganda kunveno.

Mi fine rimarku, ke nuntempe ni holandanoj estas superŝutataj per helpopetoj, kaj multe da mono transloĝas al la landoj, el kiuj nun venas la plendo pri du personoj de tempo al tempo petantaj subtenon.

Oni ne atentigu min pri la pli bona stato en Holando kompare al la eksterlando — mi scias. Eĉ se ni konsideras tion, ni certe povus toleri la komparon.

Por la Ned. Fed. de Lab. Esp.:
A. Kloek, sekretario.

Rim. de Red.

Kompreneble miaj vortoj pri la mondvagemuloj kaj naturhomoj unuavice estis ĝenerale opiniitaj. Mi ne scias, ĉu la du nederlandanoj nun estas la solaj Esperantistaj mondvojaĝantoj, ĉar mi ricevis diversajn leterojn de mondvojaĝantoj, kiuj deziris publikigon de helpopetoj. Entute, la nombro de helpopetoj de Esperantistoj kreskis en postmilita tempo tiam, ke oni devas efektive kredi, ke certaj homoj — precipe en malbonvalutaj landoj — lernis Esperanton por la sola celo tiri facilmaniere la monon el la poŝoj de siaj „samideanoj“.

Tamen, mi volas konfesi, ke duavice mi celis ankaŭ la du nederlandanojn, ĉar en la leteroj, kiujn ili skribas, ili fakte plendas pri nesufiĉa subteno, kvazaŭ la Esperantistoj estas devigitaj ne nur helpi, sed tute subteni ilin. Ekzemple, ili plendas publike, ke iu sveda samideano en Dresden



Hagen. — La Magistrato.

burgunda vino. Mi atentigas vin, ke trinkinte vi svenos unu aŭ du minutojn; sed tuj poste, kvazaŭ kun renovigita animo, vi povos komenci la esplorojn. Fartu bone kaj skribu al mi al Hastinapura pri la rezultato de viaj esploroj. Radjendra-Lalamitra salutas vin kore; same miaj mastroj-bramanoj, kiuj vin konas el miaj rakontoj. S. Lariŝ.“

Profesoro Selest estis ravita. Jam li sentis sin estro de l' tempo, jam senprempense li volis eltrinki dek gutojn de l' elsendita fluidaĵo, tamen li haltis.

„Kvieton, kvieton!“ li diris al si kaj antaŭ ĉio preparis la mikroskopon, starigis la ekranon. Poste li elektis inter la preparaĵoj tiun, kiu ŝajnis al li la plej taŭga. Li havis tie diversajn ŝimojn kaj fungojn fiksitajn en parafino; li havis bacilojn, mikrokokojn, spirohitojn; li havis Laboulbeniales, nevideblajn muskojn, florantajn sur la korpo de akvoskaraboj ktp. Li havis fine ŝimon or-verdan, kiun li mem trovis sur la floroj de fuksio, kaj kiun li nomis — laŭ la nomo de iam amata kaj tro frue perdita virino — „Vandamarla Selesti.“

Ci tiun ŝimon nia profesoro elektis por siaj esploroj. En la koncernen lokon de l' mikroskopo li enmetis la vitron kun la preparaĵo, reguligis la speguletojn kaj projektilis.

Li mallumigis la laborejon kaj tuj ekvidis sur la tolo la bildon, kiu pro nekonata kaŭzo ŝajnis al li hodiaŭ nebulumita. Tiu bildo granda preskaŭ unu metron montrigis al li kiel aro da akveverdaj kugletoj kaj paleoraj kernetoj; vitrecaj sukaj fluvis energie tra la ĉeloj, briletante ĉielarke; poste fariĝis mallumo.

La profesoro starigis la fotografan aparaton kaj faris la bildon. Nur tiam li komencis prepariĝi al la nova, nekonata laboro. Li prenis novan

preparaĵon de Vandamarla — kaj fiksis ĝin en la mikroskopo. En solena animstato li eltrinkis 12 gutojn de la fluidaĵo sendita el Hindujo — kaj atendis la impreson. Sed la unua momento li sentis nenian ŝanĝon, sed baldaŭ malheligis antaŭ liaj okuloj kaj ŝajnis al li, kvazaŭ li ekdormis pro ĥloroformo. Tamen li estis sufiĉe konscia por esplori sian spiritan staton; li sentis, ke la nova fluidaĵo en li disvolvigis; kvazaŭ li estis la sama kiel antaŭe, kaj tamen alia.

Selest nomis poste la fluidaĵojn: multiplikator temporis. Rigardante ĉirkaŭe — li pli sentis ol vidis, ke la mondo rigidigis; momente la esploristo troviĝis en absoluta mallumo kaj senkonsciigo.

Subite li vekigis, pli koncentrita spirite ol iam antaŭe. Li sentis en si kvazaŭ novan potencon — ni diru — tre intensan konscion pri nova, kvara dimensio — la tempo.

Li rigardis la horloĝon: estis la 2-a horo, 12 minutoj, 37 sekundoj, 5 tercioj, kion li rapide notis.

Sur la ekranon li havis antaŭ si la saman bildon kiel antaŭe, tamen baldaŭ la nebulo, kovranta ĝiajn sekretojn, disigis kaj la detaloj aperadis pli kaj pli klare.

Kion li opiniis ĉelplasma, estis kvazaŭ verde-argenta nebulaĵo senĉese, rapide rondkuranta ĉirkaŭ sia akso. Subite la nebulaĵo ekflamis purpure kaj disfalas je kelkdeko da pli aŭ malpli grandaj kugletoj; unu el ili, centra, havis la dimensiojn de oranĝo, koloron ore-ruĝan kaj en la malhela laborejo jetadis eĉ specon de radioj. Aliaj — malpli helaj, sed brilantaj kugletoj, kun verda nuanco — komencis rondflugi ĉirkaŭ tiu granda ruĝa kuglo, ĉiu sur sia rondo aŭ pli ĝuste elipso.

La brilo de tiuj kugletoj paliĝis malrapide kaj estiĝigadis, kiam la oranĝo konstante brilis.

Rondkurante, tiuj kugletoj turnis foje unu, aliffoje alian flankon al la oranĝo kaj kiam unuflanke ili estis lumigataj, aliaflanke ili dronis en mallumo. Precipe unu kugleto, sate-verda, logis la atenton de Selest.

Li reguligis la koncernenan speguleton de l' mikroskopo tiel, ke ĉiuj kugletoj kune kun la oranĝo malaperis kaj restis nur unu, kiun Selest nomis Mea t. e. mia; ĝi ampleksis la tutan ekranon. Bluenta, kvazaŭ etera membrano ĉirkaŭis la tutan sferon de Mea. La kuglo rondiris konstante ĉirkaŭ sia akso kaj estis unufoje hela, kvazaŭ ora, aliffoje verde-griza. Ju pli atente la profesoro observis la movojn de tiu kuglo, des pli precize li vidis grandajn kataklismojn sur ĝia supraĵo; de tempo al tempo el ĝia interno eksplodadis fumoj kaj fajretoj, aŭ fluaĵo senkolora, kvazaŭ akvoŝalo fluus el la membrano, ĉirkaŭanta la kuglon.

Sur ĝia supraĵo Selest diferencigis du specojn de kovraĵoj: pli malmolan, verde-brunan, kiun li nomis „tero“, kaj bluenta-fluan, kiun li nomis „akvo“. Subite el la ekstera membrano komencis faladi blanka pulvoro, kvazaŭ faruno, kaj tio, kion la sciencisto nomis akvo, alprenis la formon de vitro. La fajraj eksplodoj kvietigis, kaj tio, kion Selest difinis kiel teron kaj maron — rigidigis por iom da tempo.

Kvazaŭ inspire Selest eltrovis metodon kalkuli la movojn de tiu kuglo kaj elkalkulis, ke de la tempo, kiam li ekvidis ĝin unuafoje en la briloj de l' granda oranĝo, forpasis kvar mil jaroj; kaj de la momento, kiam li ekvidis la nebulaĵojn de Vandamarla, sep mil jaroj.

Mea estis evoluinta ĝis certa formo. La vitro denove fariĝis blua, la blanka pulvoro malaperis kaj la kuglo komencis kovriĝi per verda musko, per strangeformaj kreskaĵoj, kaj en la diafana fluidaĵo (maro) montrigis koloraj estaĵoj, sendube

vivaj, similaj al baciloj kaj spirohitoj. Aliaj komencis kuradi en la ombro de muskoj kaj filikoj, kaj kelkaj flugadis tra l' aero. La profesoro kompreneble ne povis alie nomi tiujn kreaĵojn ol kreskaĵaron kaj bestaron de Mea.

Nun Selest frapetis iun ŝraŭbon de l' mikroskopo, tiel ke granda parto de l' kuglo malaperis; restis nur spaco pligrandigita ĝis unu metro. La spaco ŝajne estis senmova. La profesoro do ekvidis kvazaŭ pejzaĝon, en kiu oni povis diferencigi (parolante home) marbordon, rokojn, arbarojn. Miloj da vivaj infuzorioj rondiris en tiuj vastaĵoj, formangante unu la alian, interbatalante, naskiĝante, kreskante kaj mortante. Generacioj pasadis post generacioj, jaroj kaj jarcentoj fluus kaj tiu mondo disvolvigadis pli kaj pli multkolora kaj plena je novaj fenomenoj.

Inter la loĝantoj de Mea montrigis monstro simila al lacerto, kiu komencis subite iradi sur du malantaŭaj piedoj kaj la antaŭajn uzadi por batali kun la aliaj. Tiu stranga kanguro (Bacillus bipes Selesti) estis diverskolora: ruĝa, flava, nigra, blanka, blua. Selest rimarkis, ke tiu Komo saltanta kiel pulo kaj per la antaŭaj piedoj ŝiranta de la tero muskojn kaj filikojn, batalis kontraŭ ĉiuj estaĵoj en la akvo, sur la arboj kaj en la aero. Krome tiuj lacertoj kuniĝadis laŭ la koloroj — kaj kondukis obstinajn militojn.

La blanka aro konsumadis la nigran, la blua ruĝan ktp. Tamen tiuj bacilioj laboris kun eksterordinara energio, formante kvazaŭ formikejojn. Eltrinte brilantajn ladetojn, ili komencis deĥaki la arbarojn kaj rokojn, konstrui prismajn arĝajn dometojn (kvazaŭ termitoj); en ŝetoj ili naĝadis sur la maro.

Post nelonge — en kelkaj lokoj — ŝanĝigis la pejzaĝo de Mea; malaperis la arbaroj, kaj sur la deĥakejoj montrigis arte kulturata tero. La

donis al ili nur unu markon por poŝtkarto (en tempo, kiam ilustritaj poŝtkartoj en Germanlando kostis kvaronon markon). Krome en preskaŭ ĉiuj leteroj ili aĉe parolas pri la „burgoj“ Esperantistoj kaj tamen volas esti subtenataj ankaŭ de ili.

Komence, aŭdinte pri la kuraĝa entreprenemo de s-oj Seubring kaj Stoeltje, mi estis tute favora al ilia intenco; sed legitinte iliajn leterojn en „Nederland-Esperanto“, mi senluziigis. Mi esperis, ke ili skribos pri la landoj, kiujn ili travojaĝas, pri urboj, vilaĝoj, popoloj, moroj, naturbelajoj ktp., foje ankaŭ pri interesaj aventuroj — temoj, kiuj la legantojn de Esperanta gazeto pli interesas ol ĉiamaj plendoj pri malbona akcepto de „burguloj“, pri delegitoj nekonantaj sian devon ktp. Estas tutekompreneble, ke mondvojaĝo piede aŭ bicikle ne povas esti kvazaŭ agrabla ekskurso en oportuna aŭtomobilo aŭ plezurvojaĝo en unuaklasa kupeo de luksa vagonaro; kaj kiu estas entreprenonta tian mondvojaĝon, devas jam antaŭe konsulti pri la egaj malagrablaĵoj, kiuj lin atendas: danĝeraj aventuroj, streĉaj penoj, malsanoj, malsato, eĉ morto, kaj li devas posedi sufiĉe da bonhumoro por teli facilanime venki la malagrablaĵajn situaciojn. Alle lia entreprenemo nepre estas senŝanca.

T. J.

Komerco.

Komerca Ĉambro Worms (Germanlando) por Esperanto.

Responde al demando de Germ. Esp. As. la Komerca Ĉambro Worms decidis scigi al GEA, ke ĝi sekvas ties celadojn kun vigla intereso kaj, rekonante la nebran neceson de helplingvo, opinias Esperanton taŭga plenumi tiun rolon, precipe en la komercaj interrilatoj de la popoloj. Konsiderante ankaŭ la facilecon de Esperanto, la Komerca Ĉambro Worms rekomendas Esperanton al la komercistaro interesata pri interpopola komerco.

(Laŭ raporto pri la 2-a ĉefkunveno, 21. febr. 22.)

Brazila komerca ligo por Esperanto.

La tre grava asocio „Ligo de l' komerco“ en sia kunveno de 6. febr. aprobis jenan rezolucion prezentitan de s-o Alberto de Almeida:

La Ligo de l' Komerco de Rio de Janeiro, konvinkita, ke la lingvo Esperanto solvis praktike la problemon de la helpa internacia lingvo, montrigante en siaj multaj aplikoj, speciale en la komercaj rilatoj, kiel ilo kapabla plenumi la celojn de facila interkompreno kaj de popola alproksimiĝo, decidas:

Rekomendi insiste la lernadon de Esperanto en la komercaj lernejoj kaj institutoj.

Kongresoj kaj konferencoj.

Jarkunveno kaj konferenco de Sud-Orienta Federacio

okazos je Paska Lundo (17. aprilo) en Hastings, Central Wesleyan Lecture Hall, Cambridge Road — Adreso: J. Turner, 57 Priory Avenue, Hastings.

Kongreso en Salzburg.

La komitato informis nin, ke la dato de l' kongreso estas prokrastita. La kongreso okazos nur je Pasko (16-17. aprilo). Oni atendas ankoraŭ multajn aliĝojn. — Adreso: Ferd. Peter Huber, Mönchsberg 5, Salzburg, Aŭstrio.

Scienco.

Internacia Scienca Revuo.

La traktadoj pri „Internacia Scienca Revuo“ estas preskaŭ finitaj. Eldonejo kaj administrado estas en Horrem bei Köln (ĉe „Esperanto Triumfonta“, s-o Teo Jung); redaktoro: d-ro Walter

formikejojn oni ĉirkaŭadis kvazaŭ per fortikaĵoj. Kiel ni scias, tiuj lacertoj ne vivis en harmonio kaj simile kiel la formiko ekregis la afison, tie la blanka aro tenis en la stato de afisoj — la aron nigran; simile la aro ruĝa — la bluan. Subite la blanka aro ekiris grandamase kontraŭ la ruĝa — kaj terura milito daŭranta longajn jarojn — ekestis inter ili. Miloj pereadis, blankaj kaj ruĝaj; fine la ruĝuloj falis en la staton de nigruloj, kaj la bluloj ekposedis la lokojn de l' ruĝuloj en tiu lando. Kaj jen denove la ruĝaj kaj nigraj estaĵoj kolektiĝadis al sekretaj kunsidoj — kaj subite ili ekbatalis kontraŭ la blankuloj kaj bluloj kaj faris inter ili teruran buĉadon. Nun ekregis la nigraj kaj ruĝaj kiel la formikoj kaj la blankaj kaj bluj servis al ili kiel afisoj.

Estis tamen inter la blankuloj unu kun brilanta ora kapeto kaj tiu rondiris de la blankaj al la ruĝaj kaj bluj kaj penis ilin persvadi... (Bedaŭrinde, kvankam estas certe, ke tiuj estaĵoj havis propran parolon — ne ekzistas mikrofono, kiu ĝin al ni fiksu kaj komuniku!) El la tremado de l' atmosfero estis videble, ke la baciloj krias, indignigite; nur kelkaj, diverskoloraj, stariĝis ĉe l' orkapulo, tamen la cetera aro, armita per brilantaj ladetoj, jetis sin kontraŭ ili kaj ilia estro. Ili fortranĉis la oran kapon kaj fiksisinte sur longa pinglo ĝin portadis tra la urbo.

Ĉi tiu bildo plenigis per melankolio la koron de Selest. Li preskaŭ ploris pro tiu bela ora kapeto de bacilo de plej alta tipo, kiun mortigis la barbaroj. Li ne plu volis vidi tian teruraĵon.

Li turnis la ŝraŭbon kaj denove aperigis la tutan globon de Mea. Li rimarkis sur ĝi regulajn liniojn, kiujn li unuamomente komparis kun la kanaloj sur Marso. Tie ĉi kaj tie troviĝis metalaj fadenetoj, sur kiuj ruliĝis skatojetoj sur radetoj. Sur la maro naĝis multaj ŝteloj kun divers-

Döhler, Riesa; d-ro Róbin, Warszawa; s-o Rollet de l' Isle, Paris; s-o E. Wülster, Berlin. Adreso de la redaktejo: D-ro Walter Döhler, Riesa (Elbe), Germ.

La unua numero de la Scienca Revuo aperos antaŭvideble en malo. Intertempe la jam pagintaj abonantoj al Sc. Revuo ricevos senpage tiujn numerojn de ET, kiuj enhavas oficialajn sciigojn pri l. S. A.

La provizora estraro de la Scienca Asocio estas: Rollet de l' Isle, prez.; Rousseau, sekr.; Döhler, helpsekr.; Arnhold, kasisto.

Poŝto.

Enketo en Brazilio.

D-ro Pires do Rio, ministro de Publikaj Laboroj, ricevinte skribpeton de s-o Otto Reber, prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj, sendis la 4. febr. al la direktoroj de la poŝto kaj telegrafo jenan ordonon:

„Mi rekomendas, ke vi sendu al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, d-ro Couto Fernandes, supera telegrafinstruisto, liston kun la nomoj kaj adresoj de ĉiuj oficistoj, kiuj jam scias Esperanton, ĝin lernas aŭ estas al ĝi simpatiaj.“

Per cirkuleroj la cititaj direktoroj sciigas ĉiujn poŝtajn kaj telegrafajn oficistojn pri tiu decido.

Laboristaro.

Distrikta kunveno en München (Bavarujo) okazis la 11.—12. marto partoprenata de delegitoj el lokoj Augsburg, Garmisch, Ingolstadt, Miesbach, Pastetten, Schweinfurt, München kaj Linz a. Danubo. Eĉ Aŭstrio estis reprezentata de k-do Stöber. Okazis vigla kaj fruktodona diskutado pri propagando kaj organizo. Estis oficiale fondita la poresperanta distrikto de la GLEA-grupoj en Bavarujo. La venonta distrikta kunveno okazos je Pentekosto en Nürnberg.

(Laŭ raporto de s-o Konrad Deubler, Arcisstr. 48, il., München.)

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Samideanoj forlasintaj Eŭropon.

La simpata prezidanto de Kataluna Esp. Federacio, s-o Joan Gili Norta, enŝipiĝis en Barcelona la 10. marto por entrepreni dujaran komercan vojaĝon al Suda Ameriko. En tiu ĉi jaro li vizitos la urbojn Cali, Popayan kaj Pasto en Kolombio, Quito kaj Guayaquil en Ekvatorio. 1925 li intencas daŭrigi sian vojaĝon al Perovio.

S-o C. F. Stork, ingenero, unu el la direktoroj de la firma Fratof Stork & K-jo en Hengelo, subtenanto de loka Esp. klubo „La Tventra Sielo“, forveturis kun edzino la 28. marto per ŝipo „Johan de Witt“ el Genova al Nederlanda Hindujo por resti tie duonan jaron.

Esp. kurso en 8 lecionoj

enpresis jenaj svedaj gazetoj: Sala-Posten; Sydöstra Sveriges Dagblad, ĉiutaga; Hudiksvalls Nyheter, ĉt.; Arbetaren, ĉt.; Nya Folkets Röst, ĉs. abstinencula; Templaren, ĉs. abst.; Kontorsvärdin, ĉm. por kontoristoj. Kelkaj aliaj gazetoj promesis enpresi la kurson.

Tiuj kursoj havas la efikon, ke multaj personoj skribis mendante ŝlosilojn, kiuj estas rekomenditaj en la unua leciono.

S-o gimnazia instruisto Harald Skog, Ystad, verkis la kurson.

En Brazila ŝtato Ceara

ekzistas kursoj en la ĉefurbo Fortaleza (gvid. s-anoj Moacyr Caminha kaj Francisca Falcao) kaj en Crato (gvid. s-o Manoel Feltoza).

Britujo.

En Preston kurso post paroladoj de s-oj Merchant kaj Holmes. Nova grupo en Deal.

Nederlando.

La 14. marto s-ino Isbrücker, invitita de la Kooperativa Ligo de Virinoj (sekcio Hago) parolis pri Esperanto. La bela kolekto de 80 lumbildoj de Dresden, Praha kaj postvojaĝo estis montrata la 12-an fojon en Nederlando. La sekvinatan tagon komencis nova kurso kun 17 p.

Franclando.

Oni energie preparas la kongreson en Béziers. Hispanaj kaj italaj samideanoj bonvolu atenti la prospekton aldonitan al la hodiaŭa numero de ET pri la kongreso Detalojn ni komunikos ankoraŭ, se eble, kun kelkaj vidaĵoj de Béziers.

En Limoges kurso por skoltroj.

S-ano s-o Doceul, ekskolonia administristo en Hindujo, sendis petkribon pri Esperanto al la Ministro de Publika Instruado kaj al ĉiuj membroj de la Interparlamentara Komerca Konferenco.

En Dahome (Afriko),

franca kolonio, en loko Cotonou estas samideano subleŭtenanto Sajour.

Germanlando.

Berlina Esp. Grupo aranĝis la 7. marto festenon je honoro de sia prezidanto dum multaj jaroj kaj nomis lin honora prezidanto.

Nova grupeto en Xanten (Rejnlando).

Hindujo.

En Bombay s-o Divekar komencis Esp. kurson sub la aŭspicioj de la Bahal Assembly de Bombay. Grupo fondota.

Jugoslavio.

En Beograd s-o Klajić fondis „Artistan Grupon Esperantistan“. Kurson por oficiroj gvidas s-o Jovanović.

En Osijek kurso por poŝtoficistoj.

Kurseto en Sinj (Dalmatio).

Polujo.

En Wielun komencis propagandi s-ano Fr. Ender, Esperantisto de 1887, tradukinto de „Amabilet“, „A.B.C.“ k. a., lama prez. de Pola Esp. Soc. en Lodz. Li nun gvidas kurson kun 20 ŝtataj kaj aliaj oficiroj. Filio de P. E. S. baldaŭ fondota.

En Kraków kaj entute en Okcidenta Galicinia movado, kiu ŝajnis brilanta antaŭ kelkaj monatoj, estas malvigla pro la inercio de kelkaj samideanoj. Sola rezultato de la okazinta en „Societo Esperanto“ kurso estas, ke en novembro 1921 aliĝis al ĝi 70 personoj kaj restis — 5! Kelkaj novaj samideanoj elvenis el la privata instruero de s-o Dreher

Usono.

En Philadelphia fondiĝis grupo „Antaŭen“, kiu gvidas tri kursojn (unu por hebreoj). Sekretario s-o M. Perlow, 762 S. 5th St.

Ankaŭ estiĝis nova grupo en gimnazio de urbo Nicolet, Minnesota.

En Leesville, La., parolado kaj kurso kun 36 p.; aliaj kursoj en Boston kaj Cleveland.

400.

La disvastiĝo de ET prosperas konstante. De l' komenco de tiu ĉi jaro la abonantaro kreskis je pli ol 400. La nombro de la pagantaj legantoj nun estas ĉ. 2900, la deviga eldonnumero 3200, la efektiva eldonnumero 3500—4000 aŭ pli.

Selest estis ravita, preta preĝi al Brama pro la favoro donacita al Lariŝ.

Tamen en la sama momento, kiam komenciĝis la renaskiĝo de l' kosmo, kiu malaperis pro la terura katastrofo, la tuta vidaĵo paliĝis kaj mortis, kaj Selest ekvidis sur la ekranon la kutiman pli-grandigitan bildon de Vandamaria; plektajon da rondformaj ĉeloj kun briletantaj kernoj plenigitaj per paleverda suko.

Anehaspati ĉesis efiki.

Selest rigardis la horloĝon: estis la 2-a horo, 32 minutoj, 51 sekundoj, 38 tercioj.

Tiu ĉi grandega, je 72000 jaroj kalkulita kataktismo — kreiĝo kaj pereado de potenco sistemo da globoj — daŭris 20 minutojn, 14 sekundojn kaj 35 terciojn.

Kun la permeso de l' aŭtoro el la pola lingvo tradukis *Br. Kuhl.*

Recenzejo.


LIBROJ.

MEDUNARODNI JEZIK ESPERANTO. Poŝtuna gramatika sa vjezbenicom i dodatkom. Prema Kühnlovi Metod Priredilo. De d-ro Dušan Maruzzi. Zagreb 1922. Kr. Zemaljska Tiskara. 15: 20 cm. 186 pĝ. broŝur. Prezo 4 fr. fk.

„S-o d-ro Dušan Maruzzi havis bonan ideon (kaj sukceso ĝin realigis) verki plenan lernolibron por serioza studo de Esperanto“, skribas Petro Stojan en antaŭparolo al tiu ĉi libro. Efektive, la ideo de d-ro M. estis bona kaj ĝia realigo plene sukcesis. Ni povas gratuli niajn jugoslavajn amikojn pro la lernolibro kaj supozas, ke ĝi estos al ili taŭgega helpilo en la batalado por Esperanto. (R-ano)

LINGVA KURSA LEGOLIBRO, kompilita de W. M. Page. Brita Esp. Asocio. 12 1/2 x 18 1/2 cm. Prezo 10 p. aŭ 4 resp. kup.

Bonaĵo legaĵoj por komencantoj. La stilo estas simpla kaj ludfandamenta. Malfacilaj vortoj estas evititaj. Tiel la libreto estas bone uzbla en kursoj kaj por pliperfektiĝo. (H. H.)



Hagen. — Monumento sur Hohensyburg.

Al germanaj abonantoj

kiuj ankoraŭ ne abonis ĉe la poŝto, ni insiste rekomendas fari tion tuj por la venonta kvaronjaro. La abonprezo estos por aprilo-majo-junio ĉe la poŝto 25,50 gmk., dum al aliaj abonantoj, kiuj abonas rekte ĉe ni, ni devas post 1. aprilo kalkuli 3 gmk. po numero, pro la lastatempe denove grave altiĝintaj salajroj kaj kostoj por papero, preskoloro ktp. Poŝtabonantoj do ŝparas 15,50 gmk.

La Prospekto

de la firma Hirt & Sohn en Leipzig, pri kiu estis noto en la antaŭa numero, povis esti aldonata nur al la hodiaŭa numero, ĉar la sendaĵo atingis nin nur vendrede vespere, kiam la ekspedado jam estis finita. Ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu atente tralegi la prospekton.

Gazetaro.

Correio do Ceara, Fortaleza, Braz., 30. 11. 21. (Esp. ĉe Ligo de Nacioj.)
Evening Copper Journal, Hancock, Michigan, Usono, 28. 2. (Art. de A. J. Cave pri la rolo de Esp. ĉe la internacia interkompreno.)
Reichenberger Zeitung, Reichenberg, Ĉsl., 15. 3. (Art. „Germana lingvo — la vera Esperanto“), 17. 5. (Art. pri Esp. konferenco en Genève.)
Doml Svjet, Zagreb, Jugoslavio, 1. 5. (Ilustr. revuo, kun unu artikolo en kaj alia pri Esp., kaj kun bildo pri la redakcia komitato de „La Provo“.)
Közep Duna, Budapest, 28. 2. (Parte en Esp.)
Le Petit Biterrois, Béziers, Franc., 9. 5. (Art. de l-ino Roksano.) 16. 5. (Art. de Roksano pri Esp.)
L'Alliance Démocratique, Beauvais, Franc., 9. 2. kaj Progrès Civique, Paris, 25. 2. (Esp. kaj la Mara Ligo.)
Les Echos, Paris, 1. 5. (Esp. kaj la foiro de Basel.)
L'Index des Industries du Cuir, Paris, marto. (Rubriko pri Esp. movado. Art. „Esp. en la servo de la franca propagando. Art. en Esp. pri lida industrio en Svedujo.)
Peitl Parisien, Paris, 14. 5. (Artikolo.)
L'Ecole Emancipée, Paris, 11. 2. (Rekomendo de Esp. en artikolo pri interaĝo de infanoj.)
Nouvelles d'Alger, Alger, Afriko, 17. 2. (Granda artikolo pri Esp.)
Neue Zürcher Zeitung, Zürich, Svis., 9. 5. kaj belgaj gazetoj Het Volk, Het Laatste Nieuws kaj la Flandre Libérale repreas noton el ET n-o 74 pri okhora laborotago en Polujo.
Le Droit du Peuple, Genève, 8. 3. kaj 14. 3. (Artikoloj pri Esp.)
Gazette van Gent, 12. 5. (Letero el Litovio, traduko de l-ino de Rycke el „Litova Sielo“. — La ĵurnalo anoncas, ke ĝi enhavas Esp. lecionojn.)
La Flandre Libérale, 11. 5. kaj Het Volk, 11. 5., ambaŭ en Gent, kaj Het Laatste Nieuws, 11. 5., en Bruxelles raportis pri Int. Lab. Oficejo, laŭ ET.)
Bote für Stadt und Land, Xanten, Germ., 16. 3. (Art. pri fondo de Esp. rondo.)

LA SUPERO DE GERMANOJ APUD LA REJNO. 16 pĝ. Flensburg 1922. Prezo ne montrita.

Enhavas tradukaĵojn de protokoloj pri kruelaj faritaj de nigrul soldatoj en la okupacia armeo al germanaj virinoj kaj infanoj.

VORLÄUFIGES AUSSTELLER-VERZEICHNIS. (Provizora antaŭkatalogo de ekspozitorio ĉe la Printempa Foiro de Frankfurt 1922.) 96 pĝ. broŝur. Havebla ĉe Messami, Frankfurt a. M.

Tiu ĉi antaŭkatalogo estas sendata al 180000 interesuloj ĉiulandaj. Kiel novaĵoj ĝi enhavas interesajn vinletojn, kiuj plifaciligas al negermanlingvanoj la uzon de la libreto.

MILANA SPECIMENA FOIRO dissendis cirkuleron kaj prospekton en Esperanto. Sin turni pro informoj kaj klarigoj al „Piera Campionaria di Milano“, Italio.

GAZETOJ.


Brazila Vivo. 29. jan. Nova duonmonata gazeto okpaĝa. Redakto: Rua General Sampaio 530, Fortaleza-Ceara, Braz. Kun du portretoj. Teksto en brazila lingvo kaj Esperanto, bedaŭrinde la supersigno anstataŭas apostrofojn. Espereble la eldonanto povos realigi sian intencion aperigi la gazeton duonmonate.

Nova Tempo. Febr. Jam nur 4-paĝa; sed ĉu por tiujara abonprezo de 60 aŭstr. kr. (5 svizaj centimoj) oni povas pretendi pli ol 4 paĝan gazeton? La papero sola kostas pli multe!

Esperanto. Marto. D-ro Privat proponas, ke oni kolektu atestojn de infanoj pri Esperanto, laŭ la ekzemplo de sviza instruisto a-o Humbert el Le Locle. — Programo pri la konferenco de Genève.

Sennacieca Revuo. Marto. The British Esperantist. Marto. Kristana Espero. Jan.-marto. Bizantio. Dec. Amerika Esperantisto. Febr. Esperantista Junularo. Febr.-marto. Kataluna Esperantisto. Marto. Katolika Mondo. N-o 7. Marto. Marto. La Provo. Marto. Holanda Esperantisto. 16. marto. Berliner Esperanto-Mitteilungen. Marto. Corriere Balcanico-Esperantista. Febr.-marto.

Rigardo en la ĉefan navon de l' „Domo de la Tekniko“



Maŝin-konstruo — Elektrotekniko — Lumigado — Hejtado Higienaj Instaladoj

Anekso-relaro ĝis la enirejoj de la haloj. — Instalado de grupoj

PRINTEMPA FOIRO DE FRANFURTO A. M.

2-a ĝis 8-a APRILO 1922.

AMPLEKSA EKSPozICIO DE ĈIuj BRANĈOj DE LA GERMANA INdUSTRIo

Teksaĵoj: Feshalo kaj apud-konstruaĵoj Ledadoj, parfumaĵoj kaj tualet-artikloj, Bijuterioj: Domo Offenbach Suoj, ledoj kaj alajoj: Orienta Halo C Libro-foiro: Orienta Halo D Armetio: Domo Werkbund / Kemia industrio, medicino, hirurgio, sportartikloj, armetio: Orienta Halo B Ludiloj, instruiloj kaj muzikinstrumentoj: Norda Halo / Uzajoj por oficejoj, reklamo, paperaĵoj kaj pakmaterialoj: Okcidenta Halo C Tabakproduktaĵoj kaj subindustrioj: Tabak-Halo Veturiloj kaj alajoj: Okcidenta Halo B / Ilaroj kaj maŝinoj por agrikulturo: en tendoj kaj sub la ĉielo / Stal-komercadoj, ilaroj por domo kaj kuirujo, vitro, porcelano, fajenco, korbaĵoj, brosoj, balailoj kaj penikoj: Domo Gewerbe-Messhaus Mebloj, Domo Bismarck.

Aŭtuna Foiro 8.-14. okt. 1922

Informojn donas:

MESSAMT (Esperanto-fako) FRANKFURTO a. M. (Germanlando).

Oficejo en Berlino:

Messamt Frankfurt a. M., Geschäftsstelle für Gross-Berlin (Esperanto-Servo)

Berlino W 8, Charlottenstr. 56.

La Milana Foiro ne estas ekspozicio, sed internacia vendejo de interesanoj, kiu donas ĉiujare (12-27. aprilo) al komercistoj okazon negoci buŝe kun la ĉefaj produktantoj de artikloj, kiuj ilin interesas, naciaj kaj eksterlandaj. Do viziti la Milanan Foiro signifas observi tre proksime la lastajn novaĵojn, koni la prezojn kaj la pli bonajn komercaĵojn: tie oni akiras plenan konadon de ĉiuj vendkondiĉoj. Milano pro sia geografia sideo, je la kruciĝo de l' ĉefaj vojoj, kiuj unuigas la Orienton kun la Okcidento, la Nordon kun la Sudo, centro disdonanta de produktado, fonto de gravaj komercnegocoj, sidejo de moneraj interesanoj, estas precipe destinata bone influu la malĝojegigan postmilitan problemon kaj servi tuj por la produktanto kaj konsumanto.

La Foiro estas aranĝita tra publikaj promenejoj malfermitaj al la publiko kaj longaj, laŭ la trajno, je 10 kilometroj. Ĝi akceptas vendantojn kaj aĉetantojn el ĉiuj landoj kaj de ĉiuj produktaĵoj.

La foirfakoj, kiujn prizorgas komisiono de lertaj kaj honestaj kompetentuloj, estas jenaj: 1. orajfabrikoj; 2. belartaj industrioj; 3. vestaĵaro, peltoj, trikaĵoj, ombreltoj, bastonoj; 6. ledoj, surgatoj, vojaĝartikloj, ŝuoj; 7. sapoj, parfumoj, tualetartikloj; 8. bazarartikloj, brosiltoj, ludiltoj; 9. vitro, fajenco, porcelana industrio; 10. kemia industrio, farmacio; 11. fotografado, kinematografado, optiko, fiziko, iloj de precizeco; 12. paperaĵ industrioj, grafikarto, aĵoj por oficejoj; 13. teknikaj artikloj, kaŭĉukajoj kaj similaj; 14. elektro-tekniko, lumigado, hejtado; 15. metalurgio, mekaniko; 16. mebloj ĉiuspecaj, lignoj por konstruaĵoj;

struaĵoj; 17. doma meblaro; 18. muzikarto, muzikaj eldonadoj, muzikiloj; 19. aŭtoveturiloj; 20. bicikloj kaj sport-artikloj; 21. konstruado hidraŭlika; 22. importaj kaj eksportaj societoj; 23. malgrandaj industrioj, patentoj kaj eltrovaĵoj; 24. kolonioj, ktp.

La vizitanto la Foiro povos uzi jenajn profitojn: a) vojaĝtrabatojn, b) transporttrabatojn, c) pasporttrabatojn, d) servon de interpretistoj (ankaŭ Esperantistoj), e) servon de agentejo prizorganta la loĝejojn, f) servon de banko kaj de monŝanĝo, g) servon de ekspedado, h) servoj, de publikigeco, i) servon de informoj kaj klarigon k) specialajn poŝtajn kaj telegrafajn servojn, kaj fine li povos uzi Oficialan Katalogon, Gazeton kaj Tagjurnalon de la Foiro.

Milano, kiu estas vastega laborejo, kiel montras ĝiaj miloj da fumantaj kamentuboj, donas — pli ol ĉiuj aliaj italaj urboj — okazon bone kaj precize kompreni la gravecon de la itala produktado kaj konsumado. Partopreni aŭ viziti la Milanan Foiro signifas havigi al si la duoblan okazon plivastigi la ĉirkaŭon de siaj propraj aferoj kaj ĝojigi la animon per la naturaj belajoj, kiuj ĉirkaŭas unu el la plej interesaj kaj grandaj urboj.

La itala popolo, la milana popolo vin vokas frate kaj amike transiri stajn landlimojn! Nun, post kiam revenis la paco inter la popoloj, renaskiĝu tiu ĉi belega nobla konkuro de labora superemo, por ke ĝi disdonu materialon bonstaton kaj intelektan ĝojon inter la homaro!

Ippolito Piatti,

sekretario de „Esperanto Domo“, del. de UEA por Milano.

AFIŝOJ de la Dekkvara! Kiu societo, firmo aŭ individuo povas videble elmeti belan afiŝon de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, bonvolu komuniki sian adreson por senpaga ricevo de la afiŝo al la Loka Kongresa Komitato de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, Helsinki.

Abonejoj de ET en la landoj Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien. „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34 Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia. Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralov. Otto Lumpe, Trautenu. Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn. Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki. Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9. Hispana: Konrado Doménech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12-2. Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI. Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio. Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno). Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg. Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj. Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

UNUAJ PAŜOJ Facila libro por lerneja legado. Tradukis kaj aranĝis Alexandra Mexin. Rakontetoj el diversaj aŭtoroj. — Tradukoj el 16 lingvoj. — Galicismoj, ruscismoj, germanismoj. — Popolaj fabeloj kaj proverboj. Prezo 2 svis. fk. Specialaj kondiĉoj por landoj kun malalta valuto. Havebla ĉe: E. D. I. P. (Edit. Intern. Populaires) Genève, Passage Terraillet 18, Svislando. OPINIOJ. La preseraroj ne malpliigas la altan valoron folkloristan de via bela libro. — Prof. J. Süster, Saaz, Bohemio. Mi gratulas vin plej bone pri la enhavricha, lerte aranĝita verko, kiun mi travide kaj tragie kun grandega intereso. Lau mia opinio, la facilegebla libro estas trege konvena legajho por komenculoj. — D-ro Eberle, Nürnberg. Tiu ĉi libro certe sukcesos pro sia richa enhavo, pro sia vera internacieco kaj, antaŭ ĉio, pro sia mirinde facilkomprenebla stilo. Ĝhi manku en neniu Esperanta kurso. — Pola Esp. Servo, Fr. Prengel, Bydgoszcz, Polio.

Anoncu en la ĉiusemajna „Esperanto Triumfonta“!

- Erich Pfeifer, Hattingen (Ruhr), Germ., Neustr. 25, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo. S-o Friedrich Hahn, Bremen, Riensbergerstr. 22, Germanio. Mi korespondus volonte per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj interesanĝoj poŝtmarkojn kun la tuta mondo, uzante la Esperantan, germanan aŭ anglan lingvon. 40 geknaboj (14-jaraj) serĉas korespondantojn el negermanaj landoj. Skribu al Paul Hiller, instruisto, Neustadt, Oberschlesien, Unt. Mühlstraße 10, Germanio. Eisleben, Germ., Hallesche Str. 68, Wilh. Lange, interesanĝas ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kaj poŝtmarkojn. Kiu helpas fortiĝi la fervoron? — 20 germanaj limgelogantoj de la ĉeĥoslovaka limo, anoj de ĵus finita unua kurso, deziras uzi nian lingvon kaj serĉas gekorespondemulojn fremdlandajn, ne el Germanujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Ili ankaŭ deziras interesanĝoj poŝtmarkojn, ŝtatan kaj helpemon, propagandilojn kaj bildojn kun belaj inaj populitpoj. Ni respondo al ĉiu. Oni bonvolu skribi al Marlin Hirsch, Germanlando, Altwasser en Schlesien, Poststr. 16. S-o H. Bendix, komercisto, Breslau, Augustastr. 166, II., volas interesanĝoj poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. La katolika societo petas gekorespondemulojn por siaj gelnantoj. Peioj direktotaj al la gvidanto de la kurso, s-o J. J. v. Wensveen, Warmoesstr. 118, Wormerveer, Nederlando. S-o Charles G. Stuart-Menteth, 31 Upper Bedford Place, London W. C. 1 deziras korespondi precipe kun Ĉeĥoslovakio, Rumanio kaj universitataj. Fraŭlo Enriko Kosta, str. Luevedo 45, Sabadell, provinco de Barcelona, Hisp., deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo per poŝtmarkoj, poŝtkartoj kaj lertetoj. S-o Frans A. Quist, Nordingrån, Sved., deziras korespondi kun socialistaj samideanoj en ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj lertetoj pri fondiĝo de socialista internacia Esp. gazeto. Viva Socialismo kaj Esperantismo! Gekamaradoj!

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo (Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando) Tradukas cirkulerojn, komercajn lertetojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj. Prokuras komercajn adresojn. Prizorgas la anoncadon en Nederlando. Interrilatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj. Sciigas la kurzojn de valuto kaj valorpaperoj.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interesanoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj. Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Esperantiganto por la perslingvaj Bahaj-skribaĵoj tuj serĉata. Proponoj kaj provoj petataj de Hans Böning, Stuttgart, Germanl. Libanonstrato 45.

Anoncetoj.

- FIANĈIĜO. S-o Alfredo Santoni, doktoro de astronomio, kun f-ino Maria Peynelli, anoncas sian fianĉigon. — Torino 6, Via Belfiore 1, Ital. PETO. Matriĉa studento petas bonkorajn samideanojn (bonvalutlandanojn) je monsubienco por kongresa vojaĝo al la XIV-a. Sinceran dankon jam nun. Oni skribu al: Pola Esperanto Societo, Poznan, Polujo, Wjazdowa 10, I. PUBLIKA AVERTO. La administracio de ET avertas pri s-o Varčo Jovčev en Gabrovo, Kaŝite, Bulgario. Li mendis ET kaj akceptis ĝin dum tuta jaro, sed ne pagis. Ni avertas ĉiujn samideanojn, ke ili nenion liveru al la nomita sinjoro, se li ne antaŭe pagis. RONDETO DE ESPERANTISTINOJ en Praha aranĝos la 25. mario, je 19.30 h., amuzan „Esperantan Rondon“, en ĉambrego de „Hlakol“, Riegrova nábreží 18. Post la programo dancado. Venu ĉiuj kaj alvenigu gastojn! SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocourek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 3-14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenaro de Esperantaj sigelmorkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj. PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, eks-ĝos sian misian laborkampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos lertetojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantajn ĝeinlandojn. Responde li sendos lertetojn kaj Burmajn kaj Hindujajn kartojn. ESPERANTAJ INFANOMOJ. En junio ni atendas nian unue-naskitajn(inoj)jn. Kiu scias verajn Esp. antaŭnomojn, bonvolu sciigi ilin al subskribinto. La mallongigo devas esti facile elparolebla. Dankos s-o A. A. Suerink, Platvoet 96, Diepenveen, Nederl. LETERVEPERON, por havigi al la kursanoj korespondantojn, aranĝas Esp. klubo „La Stelo“, la 1-an de aprilo 1922. Sendu tuj lertetojn kaj kartojn al f-ino Maria Sandberg, Asgatan 25, Eskilstuna, Svedujo, aŭ al s-o Erik Nilsson, Bergsgat. 22, Eskilstuna, Svedujo. Ĉiu nepre havos respondon!

ARTAJ INSIGNOJ. „Agrable surprizita pri ilia ĉarma aspekto, s-o Poncet, vic-ĉefdel. de UEA en Lyon, varme rekomendas la artajn insignojn de f-ino Gérard, 9 rue d'Armaille, Paris 17.“

JAPANA POŜFORNO. Oni deziras aĉeti japanan poŝtfornojn kaj karbo-pasteletojn por ĝia varmigado. Vendistoj, sendu prezaron al la adreso: M. Ribas de Pina, Comandante de Artilleria, Palma de Mallorca, Hispanujo.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

- S-o Pedro Juarez Cano, Box 148, Santa Clara, Cuba, deziras korespondi kun ĉiulandanoj per lertetoj, poŝtkartoj kaj interesanĝoj poŝtmarkojn. S-o H. van Beek, del UEA, petas korespondanton por 8 komencantoj per poŝtkartoj ilustr. Sendu ĉion al jena adreso: Bellestraat 7, Dordrecht, Nederlando. W. Schubert, Trautenu, Hauptplatz 2, Ĉeĥoslovakujo. Mi sendas 35-50 diversajn ĉeĥoslovakajn poŝtmarkojn por la sama kvarto da poŝtmarkoj el via lando. Serion da ukrainaj poŝtmarkoj (ŝagi, ne stampitaj) vendas s-o G. Kiŝinevskij kontraŭ unu svisa franko. Kvanto nelimitata. Adreso: G. Kiŝinevskij, str. A. Voitioanu 6, Bendery-Tighina, Besarabio, Rumanio. Doktoro (kuracisto) P. J. Tonkov deziras, korespondi kun ĉiuj dezirantoj, precipe kun germanaj kolegoj, laŭ la profesio. Adreso: Rusio, poŝto Dvorjansk, Sibiriska gub., la popola kuracejo (ĉe-Volgujo, la malsantata regiono). S-o G. Woud, Noord 95, Wormerveer, Hollandjo, petas ĉiun sendi al li bildon, gravuraĵon aŭ karton (ankaŭ malnovaj tagas) kun vidaĵoj de ĉiuj venmuelejoj. La del. de UEA suprenomita respondo, laŭeble per kartoj aŭ malnova Esperantaĵo. S-o V. Bonde, Stenslund 2, Falun, Sved., deziras korespondi kun gebontemplanoj ĉiulandaj. S-o Matti E. Mäkelä, 16-jara liceano, P. Rautatiek. 15 A, Helsinki, Finnlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj, lertetoj k. a. S-o Otto Charvát, fervoja oficisto, Trnava, stacidomo, Ĉeĥoslovakio, petas pardonon al siaj gekorespondantoj, ĉar li nuntempe estas treege okupata per ofcaj laboroj; ĉiu ricevos respondon.